



### Ŝvebas neĝ' el aer' (Leise rieselt der Schnee)

Ŝvebas neĝ' el aer', nun ripozas la ter'.  
Mondo en brilblanka vest'. Ĝoju, ja venos kristfest'.

Varma lum' en la kor', for ĉagreno kaj plor'.  
Ĉesas de l' viv' la molest'. Ĝoju, ja venos kristfest'.

Baldaŭ nokto de l' glor'. Kaj el ĉielo la ĥor'  
sonos en dolĉa majest': ĝoju, ja venos kristfest'.

### Termine

Die **wöchentliche Übungsstunde (KLERO)** findet statt donnerstags ab 19:45 Uhr in der "Evangelisch-lutherischen Kirchengemeinde Brake", Kirchenstraße 24, 26919 Brake.

Das nächste **monatliche Treffen** findet statt am 18. Januar 2005 um 19:30 Uhr in Elsfleth in der Gaststätte „Panorama“. Gäste sind willkommen.

Die **Jubiläumsfeier** anlässlich des zehnjährigen Bestehens unseres Vereins findet statt am 4. Juni 2005 in Rodenkirchen.

**Kiu volas partopreni, bonvolu informi nin.**

**Impressum:** *Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.*  
(<http://www.esperanto.de/unterweser>)

**Information und Redaktion:** Anne Höpken: 04731-4837  
Dörte Bierkämper: 04404-3368  
Andreas Kück: 04702-5044  
Mario Müller: 04732-1373

**Für Beiträge und Spenden:**  
Bankverbindung:  
Landessparkasse zu Oldenburg; BLZ 28050100; Kontonummer 298174  
(Kassenwartin: Dörte Bierkämper)

E G U - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.

# Esperanto Gazeto

N-ro 11



Dez. 2004

Sonderausgabe zur Adventszeit / Speciala eldono je la adventa tempo

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>



Nia kristnaskofesto 2004

**Ĝojan kristnaskon, bonan gliton al la nova jaro  
kaj  
sanan jaron 2005**

## EMAS-Kulturtago 2004

La 2-an de Oktobro 2004 okazis en Hanovro la 3-a Esperanto-Kulturtago de la Esperanto-Ligo de Malsupra Saksio (EMAS). Tiun aranĝon partoprenis 31 personoj, el ili ankaŭ ni ambaŭ, Alke kaj Andreas. Estis du kulturaj ĉefprogrameroj. Unue la el Taĝikio devena rusino Lena Karpunina voĉlegis kvar el siaj rakontoj: "Paradizo de sultanoj" (pri travivaĵoj de turistoj el Germanio en Egiptio), "La revo pri cirko" (pri cirko-artistino), "La milito" (pri la 5-jardaŭrinta milito en Taĝikio) kaj "Pro savo de homo" (pri okazintaĵo en sovetunia malliberejo). Pro la lastmenciita rakonto Lena, kiu nun loĝas en Berlino, estis premiita ĉe belarta konkurso de UEA. Belvoĉe kaj akompanante sin mem per gitaro, Lena ankaŭ prezentis en Esperanton tradukitajn kanzonojn el Rusio. La ĉeestantoj profitis de la okazo por ekscii ion pri Taĝikio de ŝi. - Poste la dana muziksciencistino Birthe Trærup prelegis pri albana popolmuziko. Ŝi peris vastan bildon pri la albana popolo, ties kulturo, historio, lingvo kaj kompreneble muziko. Tiucele ŝi aŭdigis surkompaktdiskigitajn muzikerojn kaj vidigis tre interesan filmon pri sia en 1959 entreprenita esplorvojaĝo tra diversaj Balkan-regionoj kun albana loĝantaro. - Plue estis atentigoj pri la en Herzberg okazontaj Esperanto-studiesioj kaj la tiea Interkultura Muzeo kaj krome pri la Germana Esperanto-Kongreso 2006 en Braunschweig. Tie en 1906 estis fondita la Germana Esperanto-Asocio. - Pliaj informoj pri EMAS kaj la kulturtago troviĝas en la Yahoo!-novaĵgrupo <http://de.groups.yahoo.com/group/Esperanto-EMAS> kaj je <http://www.aliaflanko.de/foto/> (fotoj).

(Alke kaj Andreas)



## Enigma

	1	2	3	4	5
1					
2					
3					
4			6		
5			7		

### Horizontale

- 1:** sinsidigo [sen finaĵo]; **2:** paŝi eksteren;  
**3:** fari, ke iu aŭ io estu sen aliaj [sen finaĵo];  
**4:** germana mallongigo por mil kilogramoj [unu litero!]; **5:** finaĵo de infinitivo [unu litero!];  
**6:** konjunkcio [du literoj!];  
**7:** sen akompano [sen finaĵo]

### Vertikale

- 1:** ekhavi impreson agrablan aŭ malagrablan;  
**2:** imago de io dezirata [sen finaĵo; kvin literoj!];  
**3:** buŝe sciigos; **4:** stilzo; **5:** ulo, kiu instigas pli maljunajn sinjorinojn danci [sen finaĵo]

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas esprimon por "peco da tero, ĉirkaŭ kiu ĉiuflanke estas akvo".

## Sprüche zu Weihnachten

Knecht Ruprecht, guter Gast,  
 hast du mir was mitgebracht?  
 Hast du was, dann setz dich nieder,  
 hast du nichts, dann geh gleich wieder.



Der Weihnachtsmann am Fenster klebt,  
 das Jammern sein Gesicht verrät.  
 Ich hoff', er gibt die Geschenke schnell her,  
 denn hinter ihm steht ein Grizzlybär.

## EMAS-Kulturtag 2004

Am 2. Oktober 2004 fand in Hannover der dritte Esperanto-Kulturtag der Esperanto-Liga von Niedersachsen (EMAS) statt. Daran nahmen 31 Personen teil, unter ihnen auch wir beide, Alke und Andreas. Es gab zwei kulturelle Hauptprogrammunkte. Zunächst las die aus Tadschikistan stammende Russin Lena Karpunina vier ihrer Erzählungen vor: "Paradizo de sultanoj" (über Erlebnisse von Touristen aus Deutschland in Ägypten), "La revo pri cirko" (über eine Zirkus-Artistin), "La milito" (über den fünf Jahre langen Krieg in Tadschikistan) und "Pro savo de homo" (über eine Begebenheit in einem sowjetischen Gefängnis). Für die letztgenannte Erzählung wurde Lena, die jetzt in Berlin lebt, bei einem Kunstwettbewerb des Esperanto-Weltbundes ausgezeichnet. Mit schöner Stimme trug Lena auch auf Esperanto übersetzte Lieder aus Russland vor und begleitete sich dabei selbst auf der Gitarre. Die Anwesenden nutzten die Gelegenheit, um von Lena etwas über Tadschikistan zu erfahren. - Danach trug die dänische Musikwissenschaftlerin Birthe Trærup über albanische Volksmusik vor. Sie vermittelte ein umfassendes Bild vom albanischen Volk, dessen Kultur, Geschichte, Sprache und natürlich Musik. Dazu spielte sie auf CD aufgenommene Musikstücke vor und zeigte einen sehr interessanten Film über ihre 1959 unternommene Forschungsreise durch verschiedene Balkan-Regionen mit albanischer Bevölkerung. - Weiterhin gab es Hinweise auf die in Herzberg stattfindenden Esperanto-Studienseminare und das dortige „Interkultura Muzeo“ sowie über den deutschen Esperanto-Kongress 2006 in Braunschweig. Dort wurde 1906 der Deutsche Esperanto-Bund gegründet. - Weitere Informationen über EMAS und den Kulturtag gibt es in der Yahoo!-Nachrichtengruppe <http://de.groups.yahoo.com/group/Esperanto-EMAS> und <http://www.aliaflanko.de/foto/> (Fotos).

(Alke und Andreas)